# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

..RANTWOORDELIJKE UITGEVER:
..ESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 5 N° 3 MA.APR. 1985

ATENDINDAĴOJ

VENONTA ESTRARKUNSIDO : 20 04 85 EN BRUĜO (MARKOLA KONGRESO)

19 - 21 04 85 : BRUĜO - MARKOLA KONGRESO
INFO : ROLAND ROTSAERT

28 04 85 : WEGIMONT : 3-LANDA RENKONTIĜO

Je lundo, 25-a de marto startis en St. Truiden nova Esperanto-sekcio, kiu tamen ĝis nun ne aliĝis al FEL.

Je 29-a de junio okazos en Milano manifestacio de la Eŭropaj Federalistoj. Partoprenemuloj povos verturi tien trajne je la 28-a de junio. Pliaj informoj ĉe S-ro M. Cwick.

Bonvolu ankaŭ ne forgesi vian kunlaboron kun Gazetara Servo.
Nova adreso de la respondeculoj : Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert
Villalaan 1 b. 4
1500 HALLE

I N F O R M I L O , KADROGAZETO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
FRANKRIJKLEI 140, 2000 ANTWERPEN
TELEFONO : 03/234 34 00

JARABONO : BF 150,- KONTOJ : 402-5510531-55 KAJ 000-0265338-43

---

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto | Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL<br>dumdejore (rekte) | 03/449 50 06<br>02/518 96 49 |
| Financoj, Turismo, Libroservo | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| Direktoro de Esperantocentro (librotenado de FEL) | Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| Grupa agado | Hilde Van INGELGEM-VANDRIESSCHE<br>Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| Gazetara servo | Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert<br>Villalaan 1 b.4<br>1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Sciencoj | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |

---

Tiu ĉi listo estos kompletigata post ricevo de la necesaj informoj.



# PROTOKOLO

## PRI LA ESTRARKUNSIDO DE SABATO 2-A DE MARTO 1985 EN ANTVERPENO

Ĉeestas : Erik D'HONDT (ED), Ivo DURWAEL (ID), Paul PEERAERTS (PP) kaj Jan BOVENDEERD (JB)

Przidas : ID

Protokolas : JB

Komenca horo : 10.15 h.

1. La protokolo pri la antaŭa estarkunsido (02 02 85) estas aprobita.

2.1. ED ricevis la liston de la publikaj bibliotekoj kaj preparis cirkuleron. Tiu ĉi estos dissendita. Temas pri 200-o da bibliotekoj.

2.2. PP raportas ke "VERBOND VAN HET VLAAMSE BOEKWEZEN" avertas la libro-vendistojn pri ĉiuj novaj eldonajoj, ankaŭ pri la niaj. Sufiĉas plenigi formularon kaj havigi al ili tiun.

2.3. ED ankaŭ skribis /-os al Nederlandaj bibliotekoj pri niaj eldonoj.

2.4. ED proponas al LKK de la UK en Aŭgsburg vendi la "krokodil"-kartojn el la Aalsta kongreso.
JB publikigos unu aŭ pli da ili en INFORMILO kiam restos malplena loko.

2.5.1. En punkto 5 de la antaŭa protokolo (FEL-kongreso 1986) temas inter alie pri kongresa regularo. Kompreneble, tiu ĉi regularo estas afero de FEL kaj ne de la organizantaj grupoj.

2.5.2. JB klopodos redakti projekton surbaze de la UEA-kongresregularo.

2.5.3. Por la cetero ID raportas ke ĉio bone evoluas kaj ke jam estas interkonsento pri la divido de la gajno/malgajno (50/50)

2.6. Rilate al punkto 8 de la antaŭa protokolo (laborplano por la jubilea jaro 1987 ) okazis en Leuven laborkunsido. HVI intencis partopreni ĝin por transdoni al ili la starpunkton de FEL. Ŝi ne povis tamen pro mal-sano.
La starpunkto de FEL estas ne mem fari planon, sed se ESPERANTO 2000 jes faras bonan planon, FEL pretas instigi la aliajn grupojn fari same en harmonio kun ESPERANTO 2000.
La tasko de FEL ja estas gvida kaj ordiga.

2.7. PP jam prilaboris la tekston "Fundamentele feiten ...". Ĝi tamen ver-ŝajne ne estos preta por la Lingvoborso en Bruselo je 15 kaj 16 03 85 en Anspach-centro, kie la Brusela grupo prizorgos standon.

3. FINANCOJ

3.1. El la bilanco evidentiĝas ke la "truo" estas ŝtopita kaj ke la jaro 1984 alportis netan gajnon.

3.2. ID ankaŭ sciiĝis ke restas ± FB 28.000,- distribuota el la rezultato de la UK 1982. La LKK devas ankoraŭ kunveni pri tio.

4. TAKSI STOP - " He, vi ! Veturu kun ni ! "

JB defendas la starpunkton ke ni ne devas limigi nin al kongresaj vojaĝoj, sed pri kiel eble plej multe da eblecoj, eĉ enlandaj. Laŭ li, la afero estu tiel organizita ke ĉiuj kiuj ien veturas povu sciigi tion al iu centra servo, kiu notu kaj al kiu ĉiu kiu volas profiti de tio, simple kontaktu tiun servon por esti informita pri la personoj kun kiuj ili siavice povas kontaktiĝi por plia konsento.
Lia propono ankaŭ estas prepari por la ĝenerala jarkunsido formularojn plenigotajn kaj jam fari unuan liston de pretuloj.
ED ellaboras iun tian formularon.

5. Vortaro Prisma

Ĉu eblas fari premon sur la eldonistoj ?
Verŝajne ne, ĉar la kontrakto estas tiel redaktita, ke la eldonistoj disponas pri periodo unujara , do, ĝis oktobro 1985 por la eldonado.
Tamen, ED sendos leteron.

6. Kostonotoj.

Ĉiu estrarano ricevas formularojn plenigendajn rilate al faritaj kostoj (vojaĝ- kaj aliaj).

7. Membrokotizoj.

7.1. ED kaj JB proponas iomete ŝanĝi la kotiz-sistemon, nome lasi fiksan kotizon, sed enkonduki "familiajn" kotizojn ekz. maksimume 600-frankajn. Kompreneble temas pri kunloĝantaj membroj kaj je la kondiĉo ke komplete listo estu aldonata. Plia kondiĉo estu ke sufiĉu unu nura abono al ESPERANTO PANORAMA.

7.2. ID pensas pri "dumviva membreco" je ekz. 25-obla kotizo aŭ F. 5.000,-

7.3. propono 7.1. estos akceptita kaj antaŭmetota al la ĝenerala kunsido. Pri 7.2. la estraranoj ankoraŭ iom cerbumu kaj decidu poste ĉu jes aŭ ne ĝin proponi al la ĝenerala kunsido.



8. Estrar-restrukturigo

JB ankaŭ havas planon rilate al la estraro, nome anstataŭ havi "estraranojn pri ...", starigi laborgrupojn kun ĉe la kapo respondeca estrarano aŭ komisionestro. Alivorte temas pri grupigo de respondecoj.
Al tiuj grupoj ni lasu la liberecon plene ellabori kaj realigi agadplanon kun la nura kondiĉo ke ili informu la estraron kaj ke ili, antaŭ ol fari elspezojn, submetu siajn planojn al la estraro/financa komisiono por ekzameni ĉu la plano valoras la kostojn.
En tiu kadro la estraro povus esti kunmetita jene :

8.1. prezidanto kaj sekretario kiel kunordiga kerno

8.2. financa komisiono kiu okupiĝu pri ĉiuj financaj problemoj, do, pri ĉio kio koncernas monon,ankaŭ la libroservo, eldonado, turismo ktp.

8.3. Informado / Propagando, enhavanta
- la informadon mem + la gazetaran servon
- la propagandon, kiu zorgu i.a. pri prelegantoj, ekspozic-materialo k.s.

8.4. Instruado, kiu inkluzivu
- kadrokursojn por la formado de kursgvidantoj, prelegantoj (propagando)
- la instruadon mem; prijuĝo de lernolibroj, gvidado de kursgvidantoj k.s.

8.5. grupa agado, okupiĝanta pri la kunordigado, kontaktoj inter si kaj kun la publiko, rilatoj kun la junularo ktp.

La celo estas fari el la estraro aro da servoj, je la profito de la grupoj kaj aktivuloj.
Ekz. En iu regiono iu persono aŭ grupo volas komenci agadi, sed ne disponas pri prelegantoj (unua kontakto), nek pri kursgvidanto. Normale tiu persono aŭ grupo devas povi sin turni al la propaganda servo (pere de FEL) por akiri preleganton kaj/aŭ instruanton.
Kaj la afero bone funkcios, kiam finfine ĉiujn tiujn aferojn povas gvidi nia centra oficejo. Kompreneble por sukcesi en tio ni nepre bezonas ankoraŭ kelkajn personojn, ĉu por eniri la estraron, ĉu por akcepti taskon en unu el la laborgrupoj.

Decidiĝas antaŭmeti la planon al la ĝenerala kunsido kaj klopodi trovi pliajn personojn por kunlabori.

9. Grupa enketo.

ID donas la rezulton de la grupa enketo.
<u>Kialoj por ne reaniĝi</u>

9.1. Sendepende de la Ligo :
1. maljuniĝo, malsano, translokiĝo : 13

2. troa okupiĝo : studoj, profesio, infanoj 6
3. sen enspezoj - senlaboreco 5
4. familiaj kialoj 1

9.2. Influebla per la Ligo

1. restas esperantisto, sed ne pagas kotizon (dua, tria en familio ) 20
2. malinteresiĝo pri Esperanto 14
3. personaj konfliktoj en la klubo, movado 5
4. Manko de kontakteblecoj 5
5. papera membro 29
6. malinteresiĝo pri la movado sed ne pri Esperanto 9

Fakte 9.2.1. kaj 9.2.6. estas klasigeblaj sub unu sama rubriko.

10. Ekspozicia materialo

10.1. LVS aĉetis retro-projekciilon (overhead projector) kaj pretas ludoni ĝin al aliaj grupoj/instancoj kontraŭ pago de po 300 fr.

10.2. ID proponas adapti nian ekspozici-materialon per pli moderna kaj facile portebla kaj muntebla materialo.
Kompreneblas ke tiu materialo estos disponigebla al la grupoj.

11. Test 5000

Jam kelkaj grupoj petis la adresojn el sia regiono.
Ĉu ni disponigu ilin ?
Principe jes, al interesitoj, kvankam ĉiu ricevas ESPERANTO PANORAMA-n kaj do povos mem decidi pri jes aŭ ne aliĝi al iu grupo.

12. Vesperkursoj

S-ro P. Kempeneers el Tienen havigis al la Esperanto-Centro dokumentaron rilate al la eblecoj organizi oficialajn vesperkursojn.
PP dissendis tiun dokumentadon al diversaj kursgvidantoj.

Venonta kunsido : 20 04 85 en Bruĝo okaze de la Markola Kongreso.

Fino de la kunsido : 16.45 h.

JB



# PROTOKOLO

## PRI LA ĜENERALA JARKUNVENO DE 16-A DE MARTO 1985 EN ANTVERPENO

Ĉeestas :- Aalst : L. Callebaut, Erik D'Hondt.
- Antwerpen : Ivo Durwael, Raymond Gerard, Gerd Jacques, Paul Peeraerts, Raf Segers, Jules Verstraeten.
- Beringen : Alfons Beckers, Guido Schroeyers.
- Blankenberge : Albert Marmenout
- Brugge - Paco kaj Justeco : Manuel Alberto, Th. Bondt, A. D'Hulster Fernand Roose, Georgette Wybouw.
- Brugge - Reĝa Societo : Roland Rotsaert.
- Gent : Monique Caestecker, Patrick Haerick, Arpad Lödör, Katja Lödör, H. Vermersch
- Hasselt : Marcel Aerts, ALbert Claesen
- Kalmhout : Edward Symoens
- Kortrijk : Jean-Pierre Alewaerts, Jan Hanssens, Cesar Vanbiervliet
- Leuven : Marc Van den Bempt, Herman Van Eyndt
- Mortsel : Jan Bovendeerd
- Wilrijk : Roger De Schepper
- Gasto : Wilk Jozef el Zabrze, Pollando.

Prezidas : Ivo Durwael
Protokolas : Jan Bovendeerd.
Komenca horo : 14.15.

Pri la protokolo de la antaŭa ĝenerala jarkunsido ne aŭdiĝas rimarkoj.

1. GRUPA RAPORTADO

1.1. Aalst : vidu apartan tekston

1.2. Antwerpen LA VERDA STELO : (raportas Ivo Durwael)
1984 estis komarebla kun la antaŭaj jaroj.
La plej sukcesa agado estis samtempe la plej malsukcesa. La iniciato el 1983 pagi por ĉiuj informpetintoj kaj antaŭaj membroj el la poŝtzono 2000 (Antwerpen kaj ĉirkaŭaĵo) abonon al ESPERANTO PANORAMA, devus montri rezulton en 1984. Jen tiu rezulto :
reaniĝis 31 perditaj membroj kaj aliĝis 35 novaj membroj, enute do 66 el la 112 aliĝoj en FEL pro varbkampanjo.
Malgraŭ tiu sukcesa agado, tamen la membronombro (kiu iam estis ± 350) falis de 150 ĝis 145.

Vera sukceso estis la elekto de nova prezidanto : Raymond Gerard.

1.3. Bruĝo - Paco kaj Justeco (raportas F. Roose)

La laborjaro etendiĝas de la 1-a de julio ĝis la 30-a de junio.
En 1984 aperis 4 grupaj bultenoj kaj okazis klopodo rekunvenigi kiom eble plej da malnovaj membroj. Venis 16 el kiuj 2 reaniĝis al la grupo.

1.4. Bruĝo - Reĝa Societo :(raportas Roland Rotsaert)

Malsukcesa iniciato en 1984 :
Estis kontaktoj por atingi unuiĝon aŭ almenaŭ kunlaboron de la du Esperantogrupoj kiuj agadas en Bruĝo. Ni konstatis ke malnovaj vundoj ankoraŭ ne resaniĝis. Pro tio ni ne plu daŭrigos la klopodojn.

Sukcesa iniciato en 1984 :
Britaj kaj francaj samideanoj petis al la Bruĝa Grupo Esperantista organizi en 1985 la 19-an Markolan Kongreson, t.e. trilanda renkontiĝo de Esperantistoj el Britio, Francia kaj Flandrio. La preparoj bone progresas. Je la fino de januaro jam estis 65 aliĝintoj.
Kvankam estas tro frue por diri ke la kongreso sukcesis, la nombro de aliĝintoj jam estas favora antaŭsigno.

1.5. Bruselo : (raportas Leo De Bruyne pro malĉeesto de aliaj Bruselaj membroj kiuj okupiĝas pri la lingvoborso en Bruselo.
Sukcesaj agadoj : 3 kursoj ĉiusemajnaj, tuj post la dejor- aŭ studohoroj: baza, meza kaj supera. Partoprenas 20-o da lernantoj.
Nacia lingvoborso
Monata radioelsendo.

1.6. Gent. (raportas M. Decaestecker)
Suksecaj agadoj : kadrokurso pri turismo kaj kanadaj tagoj kunlabore kun la Kanada Ambasadoro.
Ne-sukcesaj : la celo, atingi la neesperantistan publikon dum la kanadaj tagoj ne sukcesis pro tro da aktivecoj.

1.7. Hasselt : Sukcesa : nova kurso kun 32 partoprenantoj
Malsukcesa : kunvenigo de la partoprenintoj en Test 5000 : venis nur 15

1.8. Kalmthout : Sukcesa : enketo pri la kialoj de ne plu aliĝo al la grupo.
Reaniĝis 12 malnovaj membroj. La enketo malkovrigis ke konsiderinda nombro de malnovaj membroj jam forpasis.

1.9 Kortijk : tre sukcesa : la Fondaĵo Vanbiervliet (vidu aliloke)

1. 10. Leuven : malsukcesa : la Gambrinusfestoj
Sukcesa : la interna strukturo de la grupo, kiu intertempe iĝis ASPC

1.11. Mechelen : post longa silento, okazas denove regula kurso.

1.12. Mortsel : ĉefa sukceso : rekono de la grupo de la Komunuma Kultur-konsilaro kaj aljuĝo de subvencio.



1.13. Tienen : tie okazos la 2-a oficiala Esperanto-kurso de Belgio.
Tiu okazas en la Provinca Instituto por Teknika Instruado en Tienen. Ĝin iniciatis S-ro P. Kempeneers.

1.14. Wilrijk : kurso.

## LA PIONIRO - AALST

Unue mi devas senkulpigi nian prezidanton Petro De Smedt kiu estas malhelpita ĉeesti la ĝeneralan kunvenon de FEL. Tial mi mallonge raportas pri la agado de nia grupo.

Pasintjare nia grupo nombris kvardek kvar membrojn el kiuj dek ok regule ĉeestis la monatan kunvenon.
Ĉiumonate ni eldonis nian propran revuon "La Pioniro" kaj forsendis ĝin al ĉiuj grupoj de Flandrio kaj Valonio.
Pro organizaj kialoj nia elementa kurso komenciĝis nur en decembro kaj nombris ok lernantojn, kiuj ĝis nun regule ĉeestas la kurson.
La plej grava okazaĵo de la pasinta jaro estis la DUA FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO, kiu estis granda sukceso ne nur laŭ nombro de partoprenintoj sed ankaŭ laŭ financa aspekto.
Ni intencas kompili specialan numeron de nia revuo kun ampleksa raporto pri la kongreso kaj forsendi ĝin senpage al ĉiuj kongresintoj.
Ni jam faris etan statistikon pri la grupoj kiuj estis reprezentitaj dum la kongreso. Pliajn detalojn vi trovos en la speciala numero de Pioniro.

Jen mia raporto. Mi dankas vin.

### DUA FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO

| GRUPO | MEMBROJ 84 | KONGRESANOJ | POCENTOJ |
|---|---|---|---|
| 1. La Progreso | 14 | 6 | 42,8 % |
| 2. La Pioniro | 43 | 15 | 34,9 % |
| 3. Paco kaj Justeco | 34 | 7 | 20,6 % |
| 4. Brusela grupo | 20 | 4 | 20,0 % |
| 5. La Verda Stelo | 135 | 20 | 14,8 % |
| 6. Esperanto 2000 | 45 | 6 | 13,3 % |
| 7. La Erikejo | 35 | 4 | 11,4 % |
| 8. Mortsela grupo | 20 | 2 | 10,0 % |
| 9. Bruga Reĝa grupo | 36 | 3 | 8,3 % |
| 10. Limburgo | 39 | 2 | 5,1 % |
| 11. La Konkordo | 38 | 1 | 2,6 % |
| 12. Mehlena grupo | 3 | 0 | 0,0 % |
| 13. Grupo Blankenberge | 6 | 0 | 0,0 % |
| 14. Grupo Sint Niklaas | 11 | 0 | 0,0 % |
| Membroj nealiĝintaj al iu grupo: | 129 | 5 | 3,1 % |
| Nemembroj de FEL | - | 9 | |
| Valonanoj | - | 4 | |
| Eksterlandanoj | - | 12 | |
| | | 100 | |

(activiteit 1984) Antwerpen

Vereniging : Koninklijke Esperantogroep "La Verda Stelo" v.z.w.
Adres briefwisseling : Frankrijklei 40, 2000 Antwerpen tel 03/234.34.00
Nr postrekening : 000-0072654-01 Juiste benaming en adres : "La Verda Stelo Antwerpen"

| Aard der prestaties | Totaal | Subsidieerbaar | Punten | Opmerkingen |
|---|---|---|---|---|
| 1. Voordracht | 12 | | | |
| 2. Voordracht met dia's | 20 | | | |
| 3. Voordracht met debat | 1 | | | |
| 4. Voordracht met demonstratie | 5 | | | |
| 5. Voordracht met declamatie | 3 | | | |
| 6. Voordracht met fonoplaten | | | | |
| 7. Geleid bezoek | 7 | | | |
| 8. Filmvertoning (8 of 16 mm) | | | | |
| 9. Filmvertoning (35 mm) | | | | |
| 10. Filmforum | | | | |
| 11. Voordracht met film | | | | |
| 12. Toneelvoorstelling (eigen groep) | 1 | | | |
| 13. Toneelvoorstelling (andere groep) | 1 | | | |
| 14. Bijwonen van toneel- en operavertoning | | | | |
| 15. Muziekuitvoering (eigen groep) | 1 | | | |
| 16. Muziekuitvoering (andere groep) | 2 | | | |
| 17. Balletten | | | | |
| 18. Forums, colloquia e.d. | 4 | | | |
| 19. Wedstrijden (voor volwassenen) | | | | |
| 20. Tentoonstelling (zonder inleiding) | 1 | | | |
| 21. Tentoonstelling (met inleiding) | | | | |
| 22. Cursus | 14 | | | |
| 23. Tijdschrift (aantal nrs · extra) informatie n's | 2 | | | |
| 24. Culturele ontspanningsavonden | 8 | | | |
| 25. Algemene clubwerking (vb gespreks-, film-, toneelclubs) | | | | |
| 26. Speciale clubwerking (bv. lees-, luister- en discoclub) | 1 | | | |
| 27. Andere prestaties | 7 | | | |
| Totalen : | 90 | | | |

AANWEZIGEN :
Totaal aantal : 2.767
Aantal per prestaties : 31



RAPORTO LA PROGRESO 1984

januaro

06.01 laborkunveno
17.01 konversacia vespero
27.01 jarkunveno kun akcepto kaj elekto de la nova estraro Katja Lödör, prezidantino; Patrick Haerick, vicprezidanto + libroservo; René Budts, kasisto; Monique Caestecker, sekretariino; Ingrid Lievens, protokolo de la laborkunvenoj + poste tajpi kaj forsendi la flavajn invitilkartojn + eldono de la klubrevuo)

februaro

09.02 estrarkunveno
21.02 konversacia vespero
24.02 kulturkunveno. Lucien De Jaeger parolis pri speleologio kun materialo.
28.02 la prezidanto de U.E.A. s-ro Maertens venis al Gent por prelegi pri "Lingvo-problemoj en la Eŭropa Komunumo kaj solvoj". Li estis invitita de la Europaclub-Gent, klubo de studentoj de la universitato de Gent, kiuj interesiĝas pri Eŭropaj problemoj. "La Progreso" havis inform-standon tie kun Esperanto-broŝuroj kaj libroj.

marto

07.03 laborkunveno : preparo de la kadrokurso pri turismo
17.03 kadrokurso pri turismo.
eksterlandaj gastparolantoj : el Hungario :
- Tibor Vaŝko, ĝenerala sekretario de la L.K.K. dum la kongreso en Budapeŝto en 1983, parolis pri la strukturoj de la kultura laboro de H.E.A. kaj raportis pri la rezultoj de la pasinta universala kongreso en Budapeŝto.
- Bernadette Mihály el Bóly (Pecs) parolis pri la funkcio de la turisma komisiono de H.E.A. kaj montris diapozitivojn.
aliaj parolantoj :
- Adhémar Van de Velde el Gent parolis pri "Triaĝuloj en vojaĝgrupo"
- Leo De Bruyne el Bruselo parolis pri la evoluo de la esperanto-turismo kaj la celoj de Esperanto-tur kaj karuselvojaĝoj.
- René Budts prelegis pri "Urborenoviĝo" kun diapozitivoj. Poste sekvis vizito en la urbo mem.
Partoprenis 16 personoj.

RAPORTO PROGRESO 1984 (2)

17.03 samtempe kun la kadrokurso okazis rapidkurso, gvidita de Patrick Haerick. Partoprenis 12 personoj.

18.03 kadrokurso pri turismo, 2-a parto : la t.n. Zelandtur kun vizito de la Esperanto-centroj en Antverpeno kaj Roterdamo. Partoprenis 11 personoj.

20.03 konversacia vespero.

aprilo

18.04 laborkunveno : preparo de la serĉpromenado

27.04 Juliette De Mulder-De Maesschalck prelegis pri Bulgario kun filmo kaj Monique Caestecker prelegis kaj instruis "Origami", japana faldarto

majo

23.05 laborkunveno

26.05 serĉpromenado en Gent, okaze de la fino de la kurso.

junio

20.06 laborkunveno. Ni ĉefe pritraktis nian kunlaboron al ka kanadaj tago en Gent en oktobro.

22.06 René Budts prelegis pri urborenoviĝo + diapozitivoj.

aŭgusto

29.08 laborkunveno : preparo propagando Esperanto-kurso

septembro

03/04.09 informprogramo en Radio-Plus pri Esperanto. Du fojoj unu horo, prezentita de Monique Caestecker kaj Patrick Haerick, kun esperanto-muziko.

11.09 komenco de la kurso en la Volkshogeschool. 15 gelernantoj.

19.09 laborkunveno

28.09 André Coppé el Lieĝo prelegis pri "Peripetioj de hotelisto"

oktobro

10.10 laborkunveno : preparo de la kanadaj tagoj en Gent + ekspozicio

16.10 konversacia vespero

18.10 Ekspozicio, prelegoj kaj diapozitivoj pri la Esperanto Universala Kongreso en Vankuvero (somero 1984) okaze de la kanadaj tagoj en Gent
Prelegis : Michael Cwik, el Bruselo, funkciulo ĉe la Eŭropa Komunumo. Li komparis du internaciajn kongresojn en Vankuvero, unu en la angla lingvo kaj unu en la esperanta lingvo.
Hilde Van Ingelgem, el Aalst, montris diapozitivojn kaj rakontis pri la U.K. kaj ŝiaj travivaĵoj.
Ĉeestis tridek personoj, i.a. bulgara gasto kiu venis kun Leo.

27/28.10 Patrick Haerick gvidis rapid-kurson esperanto en Gent, en preparo de la FLEJA-semajnfino en De Pinte



RAPORTO PROGRESO 1984 (3)

novembro

02/04.11 Kunlaboro al la FLEJA-semajnfino en De Pinte. Patrick organizis la serĉpromenadon tra De Pinte. La temo de la semajnfino : Junuloj kaj la krizo en Eŭropo.

14.11 laborkunveno. preparo Zamenhoffesto + kotizoj.

20.11 konversacia vespero

23.11 Ingrid Lievens prelegis pri "Nigraj truoj kaj verdaj viretoj' Ĉu ekstertera vivo eblas ?

decembro

07.12 laborkunveno : preparo Zamenhoffesto kaj organizado.

09.12 kantvespero kun Esperanto-kantoj

11.12 pola grupo vizitis nian kurson kaj prezentis skeĉon.

18.12 kantvespero kaj konversacia vespero

23.12 Zamenhoffesto. Partoprenis preskaŭ 50 personoj.

Nia grupo partoprenis ankaŭ al aktivecoj organizitaj de aliaj esperanto-grupoj

24.03 jarkunveno de F.E.L. en Antverpeno. Ivo Durwael estis elektita nova prezidanto de F.E.L.

28/29.04 Xhoris. semajnfino por komencantoj, organizita de Fredo Bosmans. Partoprenis 5 anoj de nia grupo.

04.05 Antverpeno : Angelos Tsirimokos prelegis pri lingvaj problemoj en la Eŭropa Komunumo, okaze de la kunveno de membroj de la Eŭropa Klubo. Ĉeestis 4 anoj de nia grupo.

08.06 Antverpeno : vienanino prezentis diapozitivojn pri mond-vojaĝo. Ĉeestis 4 anoj de nia grupo.

14/21.07 Junularkongreso en Swanwick. Du anoj de nia grupo ĉeestis.

27.07 Antverpeno : germana vespero. Kiki Tytgat parolis pri la situacio en Berlino kaj montris diapozitivojn. 5 anoj de nia grupo ĉeestis.

18/25.08 Du anoj de nia grupo partoprenis la Polan Esperanto-kongreson en Szczecin.

31/08-02.09 La dua flanda kongreso en Aalst. Partoprenis 5 anoj de nia grupo.

06.10 Antverpeno : cerbotrombado, gvidita de Ray Gérard. 4 anoj de nia grupo ĉeestis.

21/28.10 Unu ano de nia grupo partoprenis la 10-an internacian turisman foiron en Bydgoszcz (Pollando)

03.12 Bruĝo : Vasja Cvetkova parolis pri la historio de Bulgario kaj montris diapozitivojn. Ĉeestis kvar anoj de nia grupo.

RAPORTO PROGRESO 1984 (4)

15.12 Kvar membroj de nia grupo ĉeestis la oficialan malfermon de la Esperantotur-oficejo en Bruselo kaj partoprenis la Zamenhoffeston tie.

ESPERANTO-KLUBO HASSELT
Sekcio de Flandra Esperanto-ligo
Sekr.: A. CLAESEN
Zonnebloemstraat 7
B-3610 Diepenbeek
tel.: 011/ 33 66 03

Jarraporto 1984 de Esperanto-klubo Hasselt:

1. Superrigardo 1984.

1.1. ekde majo ni duobligis la nombron de la kunvenoj, nun ni kunvenas dufoje en la monato:
la unua kunveno, speciale por la komencantoj, precipe celas la plibonigon de la lingvokono
la dua kunveno, por la tuta membraro, okazas: prelegoj, ludoj, lumbildoj, k.t.p. ...
1.2. pro profesiaj kialoj nia prezidanto, S-ro Christiaens, translokiĝis eksterlanden. S-ro Aerts anstataŭas lin kiel prezidanto.
1.3. ni kontaktis la kulturan konsilaron de Hasselt, rilate al la kolokvo en Aalst, kaj ricevis nur unu reagon (S-ro Wim Van Lishout, skabeno de Hasselt)
1.4. kiel kutime ni partoprenis la kulturan info-borson en Hasselt (1 k 2 sept. 1984). Tie ni disdonis ± 1000 broŝurojn "Samen Esperanto Leren" al ĝeinteresuloj.
1.5. post aperigo de anonco en EPC, novembron de 1984, ni ricevis 80-on da korespondpetoj el 20-o da landoj.
1.6. pro nia instigo kaj helpo, la junular-tendaro en Lanaken uzis Esperantajn nomojn por siaj tendoj kaj siaj ludoj. La temo de tiu tendaro estis: "Mia mondo estu unu mondo"
1.7. Ni invitis la Limburgajn gelernantojn de Esperanto Programita (test 5000) partopreni nian specialan kontaktkunvenon je la 11-a de marto 1985.
1.8. dum 1984 okazis du rapidkursojn (10 semajnajn). Nur 5 lernantoj aliĝis al la klubo.
1.9. tri personoj partoprenis la trian jaron de la kurso en la "Quellinstraat", unu enskribis en la duan jaron

Planoj por 1985.

2.1. organizi du kursojn: printempan kaj aŭtunan
2.2. partopreni al la info-borso (sept.'85)
2.3. klopodi organizi kursojn en aliaj lokoj de Limburgo
2.4. daŭrigi la informadon per broŝuroj en malfermitaj lokoj (kulturaj centroj, bibliotekoj, k.t.p.) kaj per lokaj radioj
2.5. Instigi nian membraron partopreni la kurson en "Quellinstraat)

A. Claesen



La Erikejo Kalmthout.
JAR-RAPORTO 1984-1985

---

29.3.84 Jar-kunveno + Kvizo "Konu vian lingvon" (P. Peeraerts)

26.4.84 Vertaaloefeningen (W. De Smet)

24.5.84 Indrukken van twee Esperantocongressen in Polen (F. Symoens)

28.6.84 Promeno en la erikejo

30.8.84 Prelego "Kanado" pri H. Van Ingelghem

27.9.84 Parolado pri fotoj

25.10.84 Debato: Esperanto kaj "Verenigd Europa"

29.11.84 Prelego "Pisarica" pri V. Coetkoper

20.12.84 Zamenhof-vespero kaj bankedo (Kickenhouve)

31.1.85 Discussie-avond "La Erikejo en haar leden"

28.2.85 Prelego "Grekujo" pri Angelo Tsirimokos

---

W. Huybrechts
2.3.85

Agado ESPERANTO 2000 dum 1984.

- kurso por komencantoj '83/84 : finis 7 kursanoj (29.2.84)
- Vesperoj 2000 : dekfoje en la jaro
- grupa vizito al la sidejo de UEA en Roterdamo : 21.1.84, 24 partoprenintoj, el kiuj 9 el Leuven
- Revuo Esperanto 2000 regule aperis 6-foje. Transprenis la redaktadon kaj administradon FG.
- Semajno de Internacia Amikeco, malferma festo : 19.2.84, ± 75/80 partoprenintoj. ne-esperantista parto : prelego de/pri Unicef, urbestro.
- ĝenerala kunveno, akcepto aspc-statutoj : 14.3.84, 8 ĉeestintoj
- ekspozicio 'Vrije basisscholen Heverlee', milo da vizitintoj : dim. 8.4.84
- partopreno librofoiro unua, 7.4 - 15.4.84, inter 20.000 kaj 25.000 vizitintoj
- rapidkurso : 5,6.5.84; 7 partoprenintoj
- partopreno (ekspozicieto) poezikunveno, 26.5.84; 30-o da ĉeestintoj
- partopreno Gambrinusfestoj, 31.5 - 3.6.85; malgajno.
- partopreno IJK Swanwick : 5 gemembroj, 13-20.7.84
- partopreno Freinet-seminario ± 15.7.84 : GJ
- partopreno FEL-kongreso Aalst 31.8 - 2.9.84 : 4 gemembroj
- duajara kurso ekde septembro 84 : 4-foje kurso, infovespero kaj V2000 en '84; 9 partoprenintoj
- partopreno kolokvo 'cerbotrombado' FEL, 6.10.84 : MV
- informvespero 17.10.84 : 17 ne-esperantistoj ĉeestas
- rapidkurso : 20,21.10.84 : nur 3 ĉeestintoj (komence 5)
- vesperkurso por komencantoj, ekde la 24.10.84 : gvidas ĝin EB; 16 kursanoj, 9 lecionoj en 1984
- partopreno en FLEJA-kongreso De Pinte : 7 gemembroj (almenaŭ)
- prezento Esperanto en P.N.Leuven : ± 110 gelernantoj; 20.12.84
- 12 estrarkunvenoj tra la jaro



Agadoplano ESPERANTO 2000 por 1985. 06.03.1985

- kurso por komencantoj '84/85 : finis 8 kursanoj (13.2.85)
- Vesperoj 2000 : jan - jun + sep - dec, dua merkredo de la monato
- Revuo Esperanto : 6-foje en la jaro : ± 1.2, 1.4, 15.6, 1.9, 1.10, 1.12. Ni transiras al kalendara jaro : la lasta numero estos 85/86-1.
- Semajno de Internacia Amikeco, 19.2.85 : 50/60 partoprenintoj. La formulo estos repripensata en '85.
- ĝenerala kunveno : 6.3.85
- partopreno en kolokvoj FEL. Unua jam 19.2.84 : HV, pri transakcia analizo
- partopreno librofoiro : se eble (petita)
- partopreno gambrinusfestoj 16 - 19.5.85 : aranĝas GJ
- partopreno IJK Eringerfeld
- duajara kurso '84/85 : ĝis junio = 7 kursvesperoj, 6 vesperoj 2000, inter kiuj teatraĵo de la kursanoj.
- informvespero oktobro '85 (16.10)
- rapidkurso 19/20.10.85
- kurso por komencantoj Leuven ekde la 23.10.85, ĝis feb. 86.
- kurso por komencantoj Tienen : en P.I.T.O., oficiala kurso, aranĝota de Paul Kempeneers.
- duajara kurso, triajara kurso (samtempe) ekde septembro '85 ĝis junio '86.
- partopreno FLEJA-kongreso '85
- estrarkunvenoj : ± 15 tra la jaro
- ankaŭ ni komencos la agadon por 1987 kaj similaj grandajn projektojn
- daŭre eblas aliĝi al skriba kurso (tra FEL)

G R U P A J   A K T I V E C O J

| | Aalst | Antwerpen | Brugge P.J. | Brugge R.S. | Gent | Hasselt | Leuven | Kalmthout | Mortsel | Totaloj |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Prelegoj | 2 | 12 | 4 | 2 | 3 | | 11 | 5 | | 39 |
| Prelegoj + Diapoz/ | 1 | 28 | 2 | 3 | 1 | | 4 | | | 39 |
| Prelegoj + debato | | 1 | | | | | | 2 | | 3 |
| Gvidataj vizitoj | | 7 | 1 | 1 | | | | | | 9 |
| Filmoj | 1 | | 1 | 1 | 1 | | 2 | | | 6 |
| Teatrajoj | | 2 | | | | | | | | 2 |
| Muziko | | 3 | | | | | | | | 3 |
| Kolokvoj | | 4 | | | | | 1 | | | 5 |
| Eksp-ioj/Info-aranĝ. | | 1 | | | 1 | | 4 | | | 6 |
| Kursoj | | 14 | 1 | | 2 | 4 | 1 | | | 22 |
| Amuzaj vesperoj | 2 | 2 | | 1 | | | 5 | | | 10 |
| Estrarkunsidoj | 11 | 6 | 2 | 1 | 11 | | 11 | | | 42 |
| Aliaj klubkunvenoj | 3 | 8 | 8 | | 2 | 24 | 18 | 2 | 48 | 89 |
| Ĝen. kunsidoj | 1 | 1 | 1 | 1 | | | | 1 | | 5 |
| Kongresoj | 1 | | | | | | | | | 1 |
| Festoj | | | 1 | | 1 | | 3 | 1 | | 6 |
| Internaciaj vesper | | 10 | 1 | | | | | | | 11 |
| t o t a l o j | | | | | | | | | | 298 |



2. ESTRARA RAPORTADO

2.1. Financa : por la unua fojo en la historio de FEL, estas profita rezulto de ± 1/2-miliono da belgaj frankoj.
3 eroj ĉefrolis en tio :
- la pentrado de la malantaŭa fasado de la Esperanto-domo (± 100.000 F.)
- la kongreso en Aalst (± 35.000 F.)
- la libroservo (± 250.000 F.) kun stoko de ± 1/2 miliono.

2.2. Informado : vidu apartan tekston

2.3. ILEI : vidu apartan tekston

2.4. Grupa agado (Inter-) - pro malsano de la komisionestrino, Hilde Van Ingelgem-Vandriessche, raportas Ivo Durwael pri la rezulto de la enketo - vidu pri tio la protokolon pri la estrar-kunsido de 02 03 1985)

2.4. Kadrokursoj : nenio nova

2.5. Sciencoj : nenio menciinda

2.6. Gazetara Servo - superrrigardo

1. Aperis 3 artikoloj pri Esperanto aŭ kun mencio de Esperanto
2. Publikiĝis 17 leteroj de legantoj.
   Pluraj leteroj estis senditaj, sed ne ĉiuj aperis.
3. Okazis 6 pres-sciigoj al 20-o da jurnaloj kaj revuoj.

Alvoko : Ni nepre bezonas plian kunlaboron por la kunigo de gazetartikoloj ktp.

Bonvolu tiurilate atenti 3 punktojn :
- la titolon de la gazeto
- la aperdaton
- la adreson.

Nova adreso de la respondeculoj :
Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert
Villalaan 1 B. 4
1500 HALLE   Tel.: 02/360 17 22

2.7. BEFA (Fervojistoj) (raportis telefone S-ro L. De Sutter al la sekretario

En Bruselo okazas kurso 2-semajna. Ĝin partoprenas 15 - 20 interesatoj. Tiu kurso nun ankaŭ estas alirebla al ne-fervojistoj, kun la konsento de la direktoraro.
Info : L. De Sutter : Tel 02/358 15 73

BEFA altiras la atenton al la ĝenerala jarkunsido Belgio-Nederlando okazonta je 13 kaj 14 04 1985 en Bergen op Zoom.

Same pri la IFEF-kongreso de 17 ĝis 25 05 1985 en VEJLE (Danlando)

Jarraporto 1984-1985 : INFORMADO

Kiel mi jam plurfoje diris, mia informa agado situas je du niveloj : tiu de FEL kaj tiu de UEA, sed plej ofte ambaŭ koincidas. Oni ankaŭ scias ke mi serĉadas radiki tiun agadon en pli solida fundo, celante atingi pli grandan efikon per malpligranda streĉado.
Mi ne povas diri ke mi jam trovis la solvon, sed mi estas konvinkita ke ni estas survoje al pli racia, efika kaj translima kunlaboro.
UEA konsciiĝas pri la problemo, kaj en Aŭgsburgo okazos antaŭkongresa dutaga seminario pri tiu problemaro, kaj la estrarano pri informado Umeda petis min organizi ĝin.

Jen kelkaj terenoj en kiuj mi iom aktivis.
1° Mi komencis efektivigi mian laborplanon en instrumedioj, skribis al la ministro, ricevis respondon, reskribis kaj daŭrigos sur tiu kampo, malrapide sed sisteme, laŭplane.
Mi nur bedaŭras ke neniu alia LA almenaŭ klopodas fari la saman eksperimenton.
2° En tiu kadro situas la baldaŭa apero de ĉefartikolo pri Esperanto en la oficiala Informatieblad de la Ministerio pri Instruado. Tiun informilon ricevas ĉiuj geinstruistoj en ĉiuj ŝtatlernejoj, proks.30.000. Estas dank'al la perado de H.Deceuninck ke ni sukcesis fari tion.
3° Ni partoprenis la internacian AILA kongreson en Bruselo, aŭgusto 1985, pri kiu vi legis sufiĉe longan raporton en la revuo Esperanto.
Sekve al la rilatoj, kiujn mi tiam havis kun prof.Nivette, oficiala Esperanto-kurso organiziĝos en la VUB ekde oktobro 1985, la unua en Belgio.
4° Okaze de renkontiĝo de ĉiuj Eŭropaj ministroj pri Instruado en Luksemburgo, por diskuti pri la fremdlingva instruado en la lernejoj, mi alskribis ĉiujn LA por ke ni samtempe atentigu niajn resp. ministrojn pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.
Nur kelkaj reagis, negative : manko de homfortoj, manko de rimedoj, ktp.

5° Interkonsente kun A.Tilmont, mi alskribis ĉiujn Eŭropajn reprezentantojn de la Eŭropa Esperanto-Unio, sekve al letero de Willy Kuypers, por informi la landajn delegitojn ĉe la Komisiono pri Kulturo de la Eŭropa Parlamento. Mi ricevis tre interesajn kaj pozitivajn respondojn el pluraj landoj.

6° Mi reagis plurfoje al artikoloj ne favoraj al Esperanto aperintaj en internaciaj revuoj : Bulletin eùropéen kaj la revuo de Ĝemelitaj urboj.

7° Mi aperigis longan, franclingvan artikolon pri Esperanto en Afriko en la revuo Dialogues en Ruando, kie tre aktiva kerno daŭrigas la laboron.



8° Mi estas en rilato kun prof.De Grève de la Genta Universitato por organizi en 1986 universitatan studtagon pri Esperanto.
Pri informado ĉe universitatoj, mi ankoraŭ povas aldoni :
a) apris nova eldono de la broŝuro de G.Pirlot pri Esperanto-instruado en universitatoj ;
b) en la daŭro de 1985 aperos mia broŝuro pri Universitataj diplomverkoj kaj disertacioj rilate al Esperanto kaj interlingvistiko Mi listigis pli ol 100 titolojn el 20 landoj.
c) baldaŭ aperos informa revueto rilate al universitata instruado de Esperanto. Eldonos ĝin prof. Companys en Paris-Vincennes ; redaktoro F.Roose ~~kaj~~ kaj provizora readakcia komitato : G.Pirlot kaj mi mem.

Kalmthout, 27-02-1985

E.Symoens

Jarraporto 1984-1985 : ILEI

Dum la lastaj jaroj, ni iom neglektis ILEI pro diversaj motivoj. La 26an de januaro 1985, M.Demonty, G.Pirlot, E.Van Damme kaj mi mem kunvenis en Bruselo por konsideri la situacion.
Ni tre konkrete kaj kritike pridiskutis ĉiujn aspektojn de la problemo kaj decidis klopodi reviviĝigi la belgajn subsekciojn.

Dimanĉe la 28an de aprilo, ni organizos ĝeneralan kunvenon en Bruselo por ĉiuj membroj.

El pluraj longaj leteroj de la internacia ĝenerala sekretario Dazzini, evidentiĝas ke ankaŭ li konsciiĝas pri la krizo kiun ni trapasas kaj ke radikala ŝanĝo estas necesa. Tiu konsciiĝo jam estas komenco de ŝanĝo...
Li proponas ke la internacia ILEI-Konferenco okazu en Belgio, julio 1986.

Kalmthout, 27-02-1985

E.Symoens

Sekretaria Jarraporto 1984

Sen ia ajn ombro da hezito, ŝajnas al mi ke nia tut-una tasko estas danki kaj gratuli nian financan komisionon, kiu sukcesis, ne nur ŝtopi la truon en la kaso - kiel iasence promesite pasintjare, sed eĉ akiri seriozan gajnon.

Nekontesteble en tio kunludis nia libroservo, kiu realigis tre gravan parton el niaj enspezoj. Jen, do, pruvo ke malpravis tiuj personoj, kiuj fingrolevante avertis kaj admonis nin, ke ni forĵetus la monon de la movado starigante nian propran libroservon. Ĉu do ni malpravis malobeante al ili ?

Jen defio alfrontata kaj venkita !

Dankon, do, al nia financa komisiono, de kiu dependas cetere ankaŭ la libro-servo. Al Paul kaj Erik mi petas varman gratul-aplaŭdon.

Daŭrigi mi volus per iaspeca anekdoto.

En la unua kvinjara ofic-periodo, fakte ekzisto-periodo de FEL, en kiu kreiĝu kaj kreiĝis la necesa sub-strukturo de nia Flandra Esperanto-Ligo (statuto, diversaj regularoj, baza organizado k.s.) estis iu knabo kiu ne malofte admonis la tiaman estraron ne tro rapidi. Li konsilis diversfoje bremsi la agadon, ĉar la risko restis ke mankas la financaj rimedoj .

En 1984 tiu knabo iĝis prezidanto de FEL kaj nun ni, la estraranoj, dubas ĉu ni ne devas admoni lin ne tro rapidi ...

Se la antaŭa prezidanto estis kviet-temperamenta, tamen ne malpli firma persono, la nuna impresas pli kiel senripoza serĉ-fosulo - dia bleto en benita akvo -. Kompreneble; li heredis grupon da jam iomete inicitaj estraranoj, kio povis plifaciligi lian taskon, sed li ne lasas al si mem, nek al la aliaj ripozon. Li daŭre incitas, daŭre elpensas novajn aŭ malkovras forgesitajn aŭ preter-lasitajn aferojn.

Antaŭen ! estas la devizo. Antaŭen !, kvankam en la pasinteco ni pli ol unu fojon devis retropaŝi. Persone tamen mi opinias ke en movado kiel la nia, pli bone estas foje retropaŝi pro troa energio ol tute ne progresi pro surloka tretado.

Jen kio donas al vi ideon de la nuntaga etoso en la estraro de FEL. Vi poste konfirmos ĉu tian vi preferas ĝin aŭ ĉu vi malaprobas ĝin, sendante ĝiajn membrojn hejmen kaj anstataŭante ilin okaze de la venonta balotado.

Ĉu okazis io vera en 1984 ?

Pli malpli ,kvankam mi substreku ke diversaj aferoj jam estis planitaj kaj preparitaj antaŭe.



Komencu ni per la novaj aferoj.

FEL - kiel servo-societo

Por pli faciligi, ne la laboron de la deĵorantoj, sed jes la societan vivon, do de ĉiu inter vi, FEL-estraro en kunlaboro kun la Esperanto-centro, peras por vi ĉiujn esperantajn revuojn. Do, fakte, por ĉio kio koncernas Esperanton, vi estonte retenu nur unu adreson : tiun de FEL.
Por tio estas formularoj je via dispono, formularoj, kiujn vi cetere bone konas

Dua servo estas profita al la grupaj kasistoj. Por ne plu devigi ilin plenigi ĉiun jaron denove la samajn formularojn, nia membro-administranto sendas al la grupaj kasistoj formularojn jam pretajn de la pasintjaraj membroj, sur kiuj sufiĉas indiki la dezirajojn de la interesitoj. Tio samtempe helpas ne forgesi aŭ preterpasi antaŭajn membrojn.

Do estonte la kasistoj devas plenigi la membroformularon nur por la novaj aŭ rekaptitaj membroj.

Tria servo estas la dissendo de LIBROVERMETO per kiu vi estas informataj pri interesaj verkoj kaj en kiu vi trovas la specialajn ofertojn kun aljuĝitaj rabatoj de nia libroservo.

Kvara servo, kvankam ne nova, estas la helpo kaj subteno de la grupoj far nia komisiono pri intergrupa agado. Jen servo iom pli agrable ekipita, ĉar tie regas la virina elemento, ege grava por normale funkcianta societo.

Kvina servo tre grava estas nia turisma servo. Ne timu ke ni volas konkurenci kun Monda Turismo. Tute ne ! Ni nur volas kompletigi tiun speciale por niaj membroj.

Pri kio temas ? Pri diversaj aferoj :

1-e : vojaĝoj :

Sub la moto "Hej, vi, veturu kun mi !"
- inter krampoj, ni ricevis tiom da reagoj al nia alvoko trovi bonan tradukon de "Zeg, hé, rij je mee ?", ke vere ne eblas ilin komuniki. Envenis unu (1) krom tiu, kiun vi ĵus aŭdis. Sed tiu ĉi estas mia, kaj do ... privilegia ...-

Do, sub la moto "Hej, vi, veturu kun mi !" ekzemple, ni volas - jes volas, ĉar por tio ni bezonas vian kunlaboron - organizi interhelpan- aŭ inter-kun-veturadon, laŭ la ekzemplo de "Taxi stop".
La ideo en si mem estas ke, kiam iu volas aŭtomobili ien, tiu avertu la kun-ordigan deĵorulon. Tiu ĉi notas kaj, se iu petas informojn pri ia veturado tiu-direkten, donas la telefonnumeron de la veturonto pro ke ili povu plie interkonsenti.
Tio pri vojaĝado.

2-e : turismo

FEL kunlaboras kun unu el la plej gravaj turismaj organizoj de Flandrio por organizi por vi ĉiun eblan eksterlandan vojaĝon, feriadon aŭ ĉion, kio estas farebla de normala vojaĝagentejo, sed kun io pli : homaj kontaktoj aŭ pli ankoraŭ, kontaktoj kun esperantistoj surloke.

Do, denove : FEL sin organizas tiel, ke ĝiaj membroj bezonas reteni nur unu adreson por ĉio kio koncernas vojaĝadon, libertempadon, partoprenon al kongresoj aŭ kion-mi-scias-pli. Do vera, praktika uzado de Esperanto ĝis en la normala ĉiu-taga vivo.
Kiu diris ankoraŭ ke Esperanto ne havas praktikan valoron ?

Sed en 1984 okazis pli :
Kiel jam dirite, FEL kreis sian propran libroservon kunlabore kun FLEJA. Vi jam aŭdis ke la rezultaton de tiu operacio estis sukcesa.
En tiu kadro amiko Erik elpensis kaj eldonas dumonate LIBROVERMETO-n, ankaŭ jam menciitan. Tio kompreneble implicas prezo-politikon, normale nemalhaveblan. Tiu libroservo fakte estas ege grava organizaĵo por niaj propraj eldonoj, kiel i.a. "Jaĥto veturas for ..." , "Manlibro por la aktivulo" k.a., samkiel diversaj broŝuroj.
Bedaŭrinda malhelpo estas la promesita sed ankoraŭ ne liverita Prisma-vortaro. Pri tio tamen kulpas nek FEL, nek nia eldonkomisiono, nek nia libroservo.

Ni menciu ankaŭ nian kunlaboron en KLUBO 100 por la jubilea jaro 1987. Laŭ lastaj indikoj, Klubo 100 nun nombras 61 aliĝintojn.

Ĉefaj kaj plej atentokaptaj en 1984 estis sendube la Semajno de Internacia Amikeco en Leuven kaj la 2-a Flandra Kongreso en Aalst.

Speciala en tiu kongreso estis la kolokvo pri "Kiel eliri la stagnadon nuntempan. Kiuj estas la psikologiaj motivoj konvinkaj"

Pri tiu kolokvo eble kelkajn vortojn pli.

Ĝin partoprenis 24 personoj el 30-o da invititoj. Inter ili estis du kiuj pruvis nigre-sur-blanke ke la titolo de la kolokvo estis misgvida (unu uzis eĉ la epiteton "defetisma"), ke stagnado ne ekzistas, sed ke male estas vera progreso.

Jen kelkaj el tiuj "pruvoj".

- la agadplano por la jubilea jaro
- eldono de Esperanto-dokumentoj
- la oficejo en Nov-Jorko
- la Eŭropa Esperanto-Centro
- la aĉet-luo de telekso far UEA
- la okazigo de kongresoj     ktp.



Nu, ĉu tiuj faktoj estas pruvoj de progreso   aŭ ĉu ni konsideru ilin kiel rimedoj al progresigo ?

Ĉu estas progreso ekzemple adreso je kiu vi povas telefoni kun respondaparato, kiu cetere respondas Nederlandlingve, poste France kaj nur trie Esperante!
Ĉu la agadplano por la jubilea jaro estas en si mem progreso ?
Ĉu eldoni dokumentojn estas en si mem progreso ?
aŭ ĉu tiuj faktoj estas rimedoj al ___ progresigo ?

Plej belan ekzemplon mi trovis en la argumento pri al evoluo de Esperanto en Aziaj kaj Afrikaj landoj. Mi certe ne volas subtaksi tion. Mi certe konsideras tion kiel seriozan progreson, sed kie restas la granda evoluo ĉi tie, ĉe ni en Flandrio ?

La dua kritikinto restis pli proksime de ni, en propra lando. Li skizis la situacion super 14 jaroj. Li tre bone faris tion, certe , sed denove klopodado je kaŝiĝo malantaŭ falsaj argumentoj.

Ĉu por doni ekzemplon, la duobligo de la paĝoj de ESPERANTO PANORAMA estas progreso aŭ ĉu tio estas rimedo al progresigo ?
En 1982 ni havis bonegan Universalan Kongreson en Antverpeno, sed ni perdis membrojn ! Progreso !
Ni akiris propran domon, sed perdis membrojn ! Progreso !
Okazis kadrokursoj bone vizitataj, sed ni perdis membrojn ! Progreso !
Okazis kursoj kaj kursoj kaj kursoj ... sed ne pli da membroj ! Progreso !
Post dek-foja organizado de la Semajno de Internacia Amikeco en Kalmthout, subite nenio pli, jam de du jaroj ! Progreso !
Pri la junularo, kiu tiutempe regule publikigis siajn raportojn kaj sciigojn en INFORMILO, laŭ interkonsento kaj kunlabore kun ni, vi legis la lastan protokolon en INFORMILO de julio/aŭgusto de la jaro 1983.   Progreso !

Ĉu ni ne surmetus laŭrokronon kaj ripozu iom post tiom da atingoj ?

Ne, geamikoj, mi ne volas malkuraĝigi vin. Tut-certe ne! Certe okazis sufiĉe multe, tion ja pruvas la aktivec-superrigardo. Sed, kion mi volas substreki, estas ke ni ne estu tro facile kontentaj pri ni mem, ne tro facile fanfaronpretaj. Ni restu realismaj, objektivaj, honestaj vid'al vide nin mem. Tio cetere ankaŭ estas la bazo de la planitaj kolokvoj.

Se vi aŭdas certajn personojn profeti pri Esperanto, vi ne kredas al viaj propraj oreloj. Ĉu vi sciis ekzemple, ke la Esperantistaro kreskis je 80 % en la lastaj du jaroj ? Ĉu ne vere, ke okaze de la Universala Kongreso en Antverpeno en 1982, iu anoncis en radio-intervjuo, ke en la mondo estas 10 milionoj da Esperanto-parolantoj ? Nu, en televida intervjuo de la 22-a de januaro 1985 mi aŭdis ke nun estas 18 milionoj da ili. Gajno do de 80 %, aŭ ĉu mi miskalkulas ?

Kaj dume, ni perdas membrojn ! Ĉu ne grandioze ?

Nu, ni pli bone finu tiun temon. Cetere, mi mensogis !
Pasintjare ni gajnis membrojn ! 20 % eĉ.
Kaj pasintjare, kiel vi jam aŭdis, niaj financoj ne estis deficitaj.
Kaj pasintjare organiziĝis nova kurso en loko kie estis nur "papera" grupo.
Kaj pasintjare la kongreso ne estis deficita.
Kaj pasintjare FEL-estraro denove vizitis la Junularan Semajnfinon en De Pinte.
Kaj pasintjare FEL organizis duan kolokvon, ankaŭ en De Pinte.
Kaj pasintjare...
mi havis unu jaron pli...
sed ankaŭ vi...
supozas mi.

Karaj, tre karaj geamikoj, por ripozi ankoraŭ ne tempestas, de longe ne. Atendas nin laboro, laborego por kiu ni bezonas kuraĝon, bonan volon kaj amikan kunlaboron. Ĉar societo povas bone funkcii nur se ĉiuj ĝiaj membroj estas pretaj fari tion, kio devas esti farita.

Bone konsciiĝinte pri tio, jen ke, en nia lasta estrar-kunsido, ni interkonsentis pri plano proponota al la nov-elektota estraro.

FEL-estraro estu la ellaboranto kaj kunordiganto de aro da servoj, favore al la grupoj kaj al tiuj,kiuj volas aktivadi.

La estraro en si mem estas fakte nur kerno de kelkaj respondeculoj ĉirkaŭataj de diversaj laborgrupoj kiuj, ĉiu sur sia definita kampo, ellaboru kiel eble plej kompletan kaj taŭgan programon. Ni pensas pri jena strukturo :

1-e : prezidanto kaj sekretario kiel kunordiga kerno
2-e : financa komisiono de kiu dependas ĉio kio rilatas al mono, do ankaŭ la libro- kaj turisma servoj.
3-e : Informado kaj Propagando, enhavantaj i.a. jenajn erojn :
- informado mem, de kiu apartenas ankaŭ la Gazetara Servo
- propagando, kiu pristudu kaj ellaboru taŭgan agadplanon kaj propagand-materialon, tiel homan kiel materian, samkiel ekspozici-materialon. Plie ĝi kunlaboru kun la komisiono pri instruado (vidu 4) por la formado de la necesaj kompetentaj propagandistoj/prelegantoj.
4-e : Instruado, kiu inkluzivas
- kadrokursojn por la formado de kompetentaj kurs- kaj aliaj gvidantoj, prelegantoj k.s.
- la instradon mem, nome la gvidadon kaj konsiladon de kursgvidantoj, prijuĝadon de lernolibroj k.s.
5-e : Intergrupa agado okupiĝonta ekz. pri la kunordigado, kontakteblecoj, inter-rilatoj ktp.



Tiamaniere ni esperas konstrui veran movadon, kies kompleto harmonie kaj se frotade funkcias. Do, vera kaj bone funkcianta centro, kiu radias al la grupoj kaj membroj kaj al kiu ĉiu povas sin turni por ricevi ĉion necesan, ĉu personojn (kursgvudantoj, prelegantojn, propagandistojn), ĉu materialon, ĉu konsilojn kaj helpon.
Ni opinias, ke se ni sukcesos tion realigi por 1987, tiu jaro povos esti vere jubilea jaro por FEL.

Klare ke la programo devos esti detale pristudata kaj diskutata, sed tio kompreneble estas la tasko de la nova estraro, almenaŭ se ĝi akceptos niajn proponojn.

Same klare estas ke por ĉion tion realigi, ni bezonas kelkajn pliajn personojn, ĉu por eniri la estraron, ĉu por kunlabori en unu el nomitaj laborgrupoj..

Kiel ajn estu, se ni volas sukcesi, ni devos, ĉiu laŭ sia kapablo, ne nur labori, sed <u>kun</u>labori, ĉar por akiri plej larĝ-skalan agadkampon, ni devas eviti individuan agadon kiu ne kadras en la ĝenerala programo.

Kiel iam diris Humphrey Tonkin, tiama prezidanto de UEA : "Kvankam neniu estas nemalhavebla, la laboro de ĉiu estas grava" ... almenaŭ se tio okazas en harmonio kun la tuto.

Dua propono rilatas al kotizoj. Por altigi la membronombron - ja fakte kuraĝiga faktoro - ni proponas priekzameni la enkondukon de "familiaj membro-kotizoj", t.e. : la kotizo mem restu senŝanĝa, sed por familioj plurmembraj ĝi estu limigita al maksimumo de ekzemple BF 600,- jare. Temas kompreneble pri <u>kunloĝantaj</u> personoj, de kiu la listo estu aldonota al la membro-formularo kaj kondiĉe ke sufiĉu nur unu abono al ESPERANTO PANORAMA.

Krome, kaj tio estas ĉefe por ne perdi membrojn, povus esti enkondukitaj <u>dumvivajn</u> membrokotizojn.

Tria propono koncernas la ĝeneralan jarkunsidon, pli precize ĝian okazodaton. Pro la fakto ke ni devas averti kaj inviti la membrojn al partopreno pere de ESPERANTO PANORAMA kaj, ĉar en certaj regionoj ĝi ne alvenas ĉiam ĝustatempe, ni volus proponi ekde venonta jaro prokrasti la ĝeneralan jarkunsidon ĝis la lasta sabato de marto.

Por fini, plia alvoko al realismo, honesto , kuraĝo kaj objektiva kritikemo vid'al vide nin mem, ne tro ligita al la pasinteco, ne tro anticepema , sed jes fronta al la nuno, laŭ la proverbo el la Zamenhofa proverbaro :
" Ne bedaŭru la hieraŭan, ne atendu la morgaŭan, ne forlasu la hodiaŭan."

JB

3. Honorigo de Cesar Vanbiervliet - 80-jara.
   Al Cesar estas transdonitaj kvanto da libroj, elektitaj de li mem por la Fondaĵo Vanbiervliet okaze de lia 80-jariĝo kaj kiel speciala danko pro la bonega laboro kiun li jam faris por Esperanto.
   Cesar, en sia dankvorto, promesas daŭrigi kaj esperas povi tion fari ankoraŭ multajn jarojn.
   Vidu poste lian leteron.

4. En sia konkluda vorto, la prezidanto emfazas ke :
   - dank'al S-ro Symoens, li sisteme pripensas ĉion kion li faras rilate al sia prezidanta tasko
   - li mem estas skeptika kontraŭ troa emfazo de administraj progresoj
   - ĉiu kampanjo estu sekvata de evaluado pri la financaj konsekvencoj
   - ĉe la bazo la grupoj bone kunagadis, faris enketojn kaj rekte kontaktis la membraron
   - grupestroj admonis la estraron, kio indikas pli malferman, pli honestan sintenon
   - kelkfoje prezentiĝas malfacilaĵoj, provenante verŝajne de ne sufiĉe persona ligo.

   Li ankaŭ alvokas, insistas eĉ, al daŭraj sugestoj, plendoj k.s. Servoj eblas nur se estas daŭra kontakto kun la bazo.
   Fine li atentigas pri laŭdinda sindediĉo de Cesar Vanbiervliet kaj liaj kunlaborantoj kadre de fondaĵo, kiu servos kaj daŭros ankoraŭ dum pluraj generacioj.

Paŭzo.

<u>2-a parto</u>

Transprenas la gvidadon de la kunsido Paul Peeraerts, anoncante la eksiĝon de la estraro.

5. Propono kaj akcepto de la administrantaro :
   - Aalst : Erik D'hondt
   - Antwerpen - LA VERDA STELO : Ray Gerard, Ivo Durwael kaj Rosette Van Herck
   - Beringen : P-ro A. Beckers
   - Blankenberge : Albert Marmenout
   - Brugge - Paco kaj Justeco : Georgette Wybouw
   - Brugge - Reĝa Societo : Roland Rotsaert.
   - Gent - La Progreso ; Arpad Lödör
   - Hasselt : Albert Claesen
   - Kalmthout : Edward Symoens



   - Kortrijk : Jan Hanssens
   - Leuven : Herman Van Eyndt
   - Mortsel : Paula Tytgat
   - St. Niklaas : Leo Corijnen
   - Wilrijk : Linda De Schepper
   - la Direktoro de Esperanto Centro Antverpena : Paul Peeraerts
   - " Eŭropa Esperanto Centro : Anne Tilmont
   - " SONORILO : Monique Vereecken
   - la komitatanoj de UEA : Gregoire Maertens kaj E. Symoens (jam administranto)
   - la ĉefdelegito de UEA (ne-membro de FEL)
   - la reprezentanto de FLEJA : ne menciita.

5.2. Kooptitaj administrantoj : (1/3 de la administrantaro )
   Proponitoj akceptitaj :
   - Wim De Smet
   - Hilde Vaningelgem-Vandriessche
   - Cesar Vanbiervliet
   - Roger De Schepper
   - Marcel Aerts
   - Monique Caestecker
   - Jan Bovendeerd

6. Estrar-elekto (minimume 5 )
   Kandidatiĝas kaj elektiĝas :
   - Erik D'Hondt
   - Ivo Durwael
   - Edward Symoens
   - Hilde Vaningelgem-Vandriessche
   - Jan Bovendeerd.

7. Kiel prezidanto elektiĝas, per ĉiuj voĉoj krom 2 :
   Ivo DURWAEL.

8. Novaj proponoj :
   La prezidanto repriparoliĝas la proponojn jam anoncitajn en la sekretaria raporto.

8.1.1. Familiaj kotizoj je maksimume 3-obla normala kotizo

8.1.2. dumviva membreco

8.1.3. ambaŭ proponoj, kvankam principe aprobitaj, estas prokrastitaj ĝis venonta ĝenerala kunsido - verŝajne en septembro - por permesi pripensadon kaj amendumadon.

8.2. Ekspozicia materialo

FEL akiros antaŭ longe tre moderna, facile portebla kaj muntebla ekspozici-materialo, kiu estos je la dispono de la grupoj kaj ekspoziciemuloj.

8.3. LA VERDA STELO aĉetis retroprojekciilon, kiu estos luebla de aliaj interesitoj kontraŭ pago de malalta sumo.

8.4. "Test' 5000"

Ĉu disponigi la adresojn de la partoprenintoj?
Multaj pledas por, aliaj hezitas.
Ĉar ja ĉiuj ricevas ESPERANTO PANORAMA-n kaj do povas por si mem decidi, ĉu jes aŭ ne aliĝi al iu grupo, la afero ŝajnas en ordo.

Fino de la kunsido : 18.00 h.

Cesar VANBIERVLIET
Oudenaardsesteenweg, 158
B 8500 KORTRIJK (België)
Tel. 056/220011
Pĉk. 000-1144142-27

S-ro Ivo Durwael
Paul Gilsonlaan 5
B 2520 Edegem

dato 25an 1.1985 n°. 14/1985

Tre Kara Amiko

El kore mi dankas vin pro viaj afablaj bondeziroj okaze de la 80a datreveno de mia naskiĝtago (24.1.1905/24.1.1985).

Mi esperas ke viaj bondeziroj efektiviĝos kaj ke mi ankoraŭ dum multaj jaroj povos daŭrigi mian laboron por Esperanto kaj mia Fondaĵo.

Dum la monato Aŭgusto 1984 vizitis mian Fondaĵon S-ro Luis Hernandez el Barcelono (Hispana Esperanto Muzeo) kaj ankaŭ S-ino Emilina Lazarova el Sofia (Bulgara Esperanto Muzeo).

La nuna stato de mia Fondaĵo

8.550 jarkolektoj de 1764 diversaj titoloj de gazetoj de kiuj jam 4.958 jarkolektoj estas kompletaj kaj plej parte binditaj.

Ĉiujare mi povas bindigi grandan kvanton da kompletiĝitaj jarkolektoj kaj nun je la 24.1.1985 la bibliotekisto permesis al mi porti ĉe la bindisto ekstran kvanton de 50 volumoj al la bindisto. Ĉu vere oni ne dorlotas min!



Vi vidis la Biblioteko bone zorgas por la Fondaĵo.

Krom nia 45 paĝa katalogo pri periodaĵoj eldonita en 1981 mi post kelkaj semajnoj eldonos 20 paĝan Suplementon kaj por la libroj nova katalogo estas preparita, la maŝinskribita ekzemplero jam nombras 190 paĝojn. Mi esperas eldoni ĝin dum 1985. Estas mia diligenta grupsekretario Jan Hannen kiu prenis sur sin la tajpadon de la kliŝoj, li ja estas lerta tajpisto kaj plie posedas tre modernan maŝinon kun 10 diversaj literotipoj.

Nu pri via oferto kiu agrable surprizis min, tamen tio bezonas iom klarigon.

Unue ĉu vi vere deziras senigi vin de via kolekto? Sen kordoloro, eble kun la ideo ke ĝi restos ne utila al mia Fondaĵo.

Fakte mi devas konfesi ke mi posedas ilin ĉiujn kompletaj. Mi ja abonas ilin.

Aŭ ĉu vi volas donaci ilin por ke mi estonte uzu ilin kiel interŝanĝmaterialo.

Pripensu tion serioze.

Ĉiuokaze mi volonte akceptos ĉion.

Ankaŭ mi dankas vin pro via afabla invito al bierverŝfesto sed pro mia aĝo mi bedaŭrinde devos rezigni vian ~~[illegible]~~ inviton.


Kvankam mia sano estas sufiĉe bona, tamen artrozo en dekstra genuo kaj kokso devigas min esti tre singarda kaj eviti multe da marŝado.

Alie mi ne devas plendi konsiderante mian aĝon.

Mi volonte iĝos 95 jaraĝa kiel mia patrino kaj 94 jaraĝa kiel mia ankoraŭ vivanta plej aĝa frato.

Kun amikaj salutoj

C. Vanbiervliet



BV. NE KROKODILI !

